MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 6

JUNIO 2019 Kol. 410/35

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Enkonduko al E-lingvo, Seminario en Skokovy, La plej sana salo, Usonaj lingvistoj, Tradicio

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

"Enkonduko al la Esperantaj lingvo kaj kulturo"

por universitataj lingvoinstruistoj-neesperantistoj

Kadre de la semajno de lingvoinstruada skipo de Krakov okazos intensiva E-kurso por universitataj instruistoj de lingvoj el diversaj landoj, neesperantistoj, kiuj partoprenas „Erasmus +“, „Staff Mobility for Training“. La 20-hora kurso okazos de la 8-a ĝis la 12-a de julio 2019, ĉiutage. La organizanto estas la Jagelona Universitato (lingva centro).
La titolo de la kurso estas: "Enkonduko al la Esperantaj lingvo kaj kulturo". La kurson prilaboros kaj gvidos Maria Majerczak.

Priskribo de la kurso:
Lingvo. La partoprenantoj lernos bazajn sciojn kaj ekkonos la strukturon de la internacia lingvo.
Kulturo. La Esperanta kulturo estos prezentita helpe de bildoj kaj mallongaj tekstoj, enhavantaj grandnombre internaciajn vortojn en Esperanto kaj elementojn devenantajn el la plej disvastiĝintaj lingvoj. Estas invitataj personoj, kiuj parolas malsa-

majn lingvojn. La oficiala formularo kaj anonco estis faritaj de la universitato - bv. trovi la informilon ĉi-aldone (pdf).

Maria Majerczak <mmajerczak@gmail.com>

Lingva seminario en la Ĉeĥa paradizo

Entute 20 geamikoj venis profiti kaj ĝui Esperanton en la pensiono Espero de la 9-a ĝis la 12-a de majo 2019. La tempo ne sufiĉis realigi ĉiujn programerojn.

Dum la renkontiĝo en la unua vespero ĉiu havis ion por rakonti pri niaj agado kaj vivo. Okazis prelego pri la afrika lando Namibio, kiun vizitis Mirka Ascherová. Prelegon pri Avulino el Skokovy permane skribitaj memoraĵoj el la jaro 1944 fare de sinjoro Mandík preparis Jindra Drahotová. Rakonton pri Japanio kaj poemojn pri ĝi de Čestmír Vidman sprite prezentis Margit Turková.

Ni kantis kun KD de „Noproblem“ danke al Líba Dvořáková kaj popolajn kantojn akompane de pianludo de Leonka Chaloupková. Pavel Brom prezentis sian filmon pri la 88-a Universala Kongreso en Gotenburgo kaj Jindra siajn fotojn el Portugalio. Pri la konstanta gaja etoso prizorgis Pavel Polnický. La vetero eĉ permesis ekskursi posttagmeze en la naturon. Bedaŭrinde la pensiono suferas pro nesufiĉa provizo de akvo kaj la konstruaĵo kadukiĝas plu.

Pri la venonta dato de nova renkontiĝo ni informos vin. Se Vi scius pri alia proksima pensiono en la regiono de la Bohemia paradizo por niaj lingvaj seminarioj, bonvolu skribi al ni.

Aĉeteblaj estis la lastaj novaj „Legaĵoj VI.“ kaj „Vyprávěnky“ – la dua volumo laŭ „La Mondo rakontas“ de Teodor Kilian spegule ĉeĥe-esperante kaj ĉeĥe tradukita libro de Kalle Kniivilä „Potomci imperia – Rusové na Baltu“, ĉiuj presitaj en aprilo 2019. Jindra Drahotová

La plej sana salo en la mondo

La kuŝejo de salo, sur kiu troviĝas la salminejo en la pola urbo Kłodawa, aĝas ĉ. 250 milionojn da jaroj. Tiam sur tiu tereno estis grandega maro nomata pole Cechsztyńskie, kiu maro forvaporiĝis. Rezulte de tio restis tre pura ŝtona salo. Tiuperiode ne ekzistis eĉ dinosaŭroj. La kuŝejo troviĝas 600 metrojn sub la marnivelo. Nuntempe oni akiras la salon pere de eksplodaĵoj, post kio la salo estas muelata, specigata laŭ la grandeco kaj speco kaj ĝi ne estas purigata aŭ pliriĉigata kiel ajn – ĝi estas tute natura.

La salo enhavas plurajn mikroelementojn, ĉar neniu procezo dum la produktado perturbas ĝian enhavon. Ĝi enhavas i.a. magnezion, kalion, kalcion kaj multe da jodo, pro kio ĝi tre diferencas kompare de pluraj saloj troveblaj en la merkato. Tiuspecaj alifaritaj saloj estas solvataj en akvo, vaporigataj, post

kio restas nur pura klorido natria sen utilaj mikroelementoj. En Kłodawa troviĝas ŝtonaj saloj en la koloroj blanka kaj roza. Tiu roza estas pli nova, de antaŭ 250 milionoj da jaroj, kaj ĝi enhavas feroksidojn.

Nuntempe akirataj maraj saloj devenas rekte de nuntempaj akvoj, kiuj ne estas tre puraj kompare kun praaj maroj – ili enhavas eĉ etajn plastajn elementojn! La ŝtona salo el Kłodawa havanta eŭropajn atestilojn, estas pli malnova, ol tiu mondkonata salo Himalaja. La salminejo en Kłodawa estas 70-jara, kaj sur ĝia tereno estas la plej profunda itinero por turistoj. Post la ekspluatado de la salo restis malpleno granda je ĉ. 20 milionoj kubaj metroj, kie troviĝas ĉ. 400 km da irejoj, parte viziteblaj de turistoj.

Homoj nemanĝantaj salon pro la timo pri la hipertensio kaŭzas grandajn damaĝojn en sia organismo. Sed atentu, mi parolas pri vera salo, riĉa je mikroelementoj, pura, ne tiu "purigita" kemie, vaste vendata en vendejoj. Eĉ la salo kun aldono de jodo ne estas bona, ĉar ĝi enhavas ne normalan, elementan jodon, sed jodidon kalian, kio estas granda diferenco kaj miskompreno. Kompreneble estas bone, ke homoj ne volas manĝi tiun ĉi tn."blankan morton". Anstataŭ tio la ŝtona salo el Kłodawa enhavas eĉ 80 mikroelementojn! Tial ĝi estas ege rekomendinda. Por bone digesti rekomendindas post ĉiu manĝo suĉi unu-du kristalojn da tiu aŭ simila salo. Tiamaniere ni helpas la kreiĝon de digesta suko en la stomako, kiu estas salacido, kaj kiu

nuntempe ofte mankas ĉe multaj homoj. Ni devas memori, ke la regreson de la stomaka enhavo kaŭzas galo kaj tripsino, kiu alkalizas la stomakan sukon – opinias kelkaj konataj al mi. La salnutrado kaŭzas, ke kreiĝas pepsinogeno, kiu permesas digesti proteinojn. Efika digestado estas por nia sano ŝlosila afero.

Enkondukado de bonkvalita salo en la organismon okazas ankaŭ pere de acidigitaj legomoj, kiucele oni ja devas aldoni salon. Kelkaj homoj asertas, ke ili ne povas manĝi ekz. acidigitan brasikon, ĉar ili tuj havas revolucion en la ventro.
Por ili ekzistas jena konsilo. Dum unu semajno manĝi ĉiutage antaŭ la matenmanĝo iom da acidigita brasiko aŭ trinki ĝian sukon kaj manĝi iomete, sed samtempe rezigni pri tritikaj produktoj kaj sukero. La digesta sistemo puriĝos post tiu revolucio (necesa batalo de bonaj kaj malbonaj bakterioj).

Krom tio rekomendindas aldoni la salon nur post la kuirado de plado. Kiam en iu manĝejo por gestudentoj oni iufoje komencis uzi la sanan riĉenhavan ŝtonan salon, baldaŭ montriĝis, ke la parametroj de la sango pliboniĝis ĉe ili tre signife. Do indas konsumi la salon!

(klarige: multaj homoj vivas laŭ ĉi supraj principoj, kaj fartas bone, malgraŭ, ke oni povas ekaŭdi kaj tralegi tute kontraŭajn konsilojn – la elekto apartenas al ni, kiuj povas kritike trakti ĉiun sciigon, kontrolante la disponeblajn informojn).

Verkis Andreo Bach el Gdynia en Pollando

Usonaj lingvistoj vizitis la E-muzeon en Svitavy

Sabate la 4-an de majo 2019 vizitis nin la geedzoj D-rino Melissa L. Curtin kaj profesoro Michael Curtin. Ambaŭ laboras en Kalifornia universitato de Sankta Barbaro, profesoro M. Curtin dediĉas sin al la fako de filmaj kaj mediaj studadoj. Doktorino Melissa laboras ĉe interkultura komunikado kaj lingvistika antropologio. Ili jam vizitis multajn lingvajn muzeojn en la tuta mondo, ekzemple en Tajvano, Parizo aŭ Brazílio. Antaŭ la E-muzeo en Svitavy ili vizitis eĉ muzeon en Vieno, kien intencas veturi ankaŭ membroj de la klubo-Svitavy dum la somera libertempo.

La gastoj interesiĝis pri la kondiĉoj de studado de fremdaj lingvoj en ĉeĥaj lernejoj pli frue kaj nun kaj plej multe ili demandis pri kaŭzoj, kial ni eklernis Esperanton kaj kiamaniere ni sciiĝis pri ĝi kaj ĉu la kondiĉoj por esperantistoj estas en tiu ĉi tempo pli bonaj ol en pasintaj jaroj.

Kaptis ilin ankaŭ la riĉa agado de la loka Esperanto-klubo, kiu estas dokumentita en fotoalbumoj kaj en kronikoj kaj iliaj eksterlandaj geamikoj. Ili admiris multegon de E-materialoj en nia muzeo dum la dekjara ekzisto. Laŭ vizititaj muzeoj ili pritaksis la helpon de la urbo, ĉar laŭ iliaj vortoj sendependaj muzeoj – kiel la nia, ne ricevadas similan subtenon. Antaŭ la fino de ilia vizito ni konatigis ilin kun la historio de la domo Ottendorfer. Ili konas la urbon Milwaukee, kien Ottendorfer

post elmigro foriris. Ĝi estas loko, kie vivas granda germana komunumo kaj kie estas multaj konstruaĵoj de eŭropa tipo kiel estas nia "Ruĝa biblioteko". Ni ricevis mesaĝon el ilia trajno, kiel ili plezuras pro nia kara akcepto kaj ili volas kun ni resti en kontaktoj. Ke ni pripensu vojaĝon al Usono.

Matěj Nárožný

Tradicio

Unu el la tradicioj de la regiono Příbram (kie mi loĝas), estas la Muzik-festivalo de Antonín Dvořák. Ĉi-jare ĝi okazis jam 51-a foje. La kialo por organizi la Festivalon estas, ke la fame konata komponisto trovis por sia familio "la duan hejmon" en ĉi kamparana regiono. Li postlasis en ĝi siajn posteulojn, kiuj en Příbram vivas ĝis nun. Ĝuste ili estas „anim-gardantoj" de la evento. Tio estis Antonín Dvořák la tria, do nepo de la Majstro, post lia forpaso (antaŭ 2 jaroj), tio estas lia pli juna filo Petr Dvořák (la pli aĝa filo Antonín ne loĝas en la regiono).

En la jaro 2004 ni, kelkaj pragaj esperantistoj, okazigis ekskurson al la PAMÁTNÍK A.D. („Memorejo de A. Dvořak), kiu situas en la vilaĝo Vysoká. En la apuda arbaro troviĝas „Rusalčino jezírko" (Lageto de la nimfo Rusalka), konata el la plej fama opero de A.D. – RUSALKA. Tiam fotis nin Boženka Lorencová, inter ni estis ankaŭ la menciita Petr Dvořák (tiama ĉičerono). Al la „skokovanoj" mi povis dokumente montri, kiel fiksiĝis la gena simileco en la vizaĝoj de jam 4 generacioj.

La Memorejo troviĝas en la vilao, kiu estis posedaĵo de la bofrato de A.D. – la grafo Kounic. Sed en la vilaĝo troviĝas ankoraŭ alia objekto: la vilao nomata RUSALKA, kiun siatempe aĉetis A.D.- kaj kiu estas posedaĵo de la familio ĝis nun. Pri ĝi zorgas Petr Dvořák (kaj liaj boparencoj). Li ebligas trarigardon de la domo, en kiu ĉio restis el la tempo de la majstra familio. Li mem plantis kelkajn tiliojn, kiuj ĉirkaŭas la domon.

La ĉi-jara festivalo daŭras de 25.4. ĝis 11.6., ĝian programon plenumas famuloj kiel Soňa Červená, Václav Hudeček, kant-ĥoro el Usono, ktp. Ĝi okazas en 18 diversaj lokoj kaj en ejoj de la regiono Příbram. Ĝi similas al la fama festivalo PRAŽSKÉ JARO (Praga printempo), kiu komenciĝas tuj poste.

Margit Turková

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.